1999 4

# KOMENCANTO

*gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj*




**Victoriano Almenures**, HAVANO, Kubo

redakcie — monda turismo — gramatiko kaj korpo — aventuroj de brava espo — rim-ludo — enigmo-serpento — anekdotoj horaroj de radioelsendoj en esperanto — korespondu!

# KOMENCANTO

**1999 numero 4/ refondita en 1997/ 8 numeroj jare**
**redaktas kaj eldonas**: Viktor Kudrjavcev
**konstanta kunlaboranto**: Rafija Jafasova
**adreso**:
620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando
**elektronika poŝto** : let@post.e-burg.su
**abontarifo** por 1999:
*internacia tarifo*:
24 nederlandaj guldenoj aŭ $12; *orienteŭropa kaj latinamerika tarifo*: $10; aŭ por ĉiuj — 15 IRK
**konto ĉe UEA**: vkud-a
*ruslanda tarifo kaj la rubla zono* , 54 рубля (за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132


# PERANTOJ
## de KOMENCANTO

*laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton*

AŬSTRALIO
Libroservo de AEA, P.O.Box 230 Matraville N.S.W 2036.
ĈEĤIO
Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice
ESTONIO
Virve Ermits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn
FRANCIO
Raoul G.Melo, 34, av de Russie, F-03700, Bellerive s/Allier
ITALIO, KROATIO, SLOVENIO
Viŝnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste
KUBO
Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO
POLLANDO
Maciej Wmuk, Skrytka 105, ul. Broniewskego 77-137, PL-01-865 Warszawa
SVEDIO
SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby
SVISLANDO
Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen
UKRAINIO
Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307, UA — 310003, Ĥarkiv
USONO
Ionel ONET, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530

ĈINIO - vakas; BRAZILO - vakas; BRITIO - vakas; JAPANIO - vakas NEDERLANDO kaj ceteraj - vakas;

# redakcie

Karaj legantoj!

Per tiu ĉi kajero ni atingis la duonon de la 1999-serio.

Ni ĝojas komuniki al vi, ke nia abonantaro tutmonde kreskis je 80% kompare al la fino de la pasinta jaro kaj ankaŭ en Ruslando kvanto de niaj abonantoj kreskas de tago al tago malgraŭ terura financa krizo en la lando. Tre bone laboras ĉiuj niaj perantoj, aparte ni volas mencii *Tom Elliot* (Aŭstralio), *Vladislav Hasala* (ĈEĤIO), *Lisbet Andréasson* (Svedio) kaj *Christoph Scheidegger* (Svislando).

Ni volas danki nian norvegan abonanton *Bård Hekland* el Petrozavodsko pro lia detala recenzo kaj analizo de "KOMENCANTO" helpe de *Otto Prytz*, vicprezidanto de Norvega Esperanto-Ligo. Ankaŭ dankon pro utilaj rimarkoj al la franca lingvisto *Renée Triolle* el Bello Bauco.

Sur la kovrila paĝo vin renkontas karikaturo de *Victoriano Almenares Alarcon* el Kubo, kiu debutis per du desegnaĵoj en la pasinta numero.

Sur la 3-a paĝo la vica elemento de nia ĉefa temo — rakonto pri la organizaĵo "MONDA TURISMO". Certe la agado de MT estas multe pli ampleksa, ol la rakonto sur unu paĝo, tial ni proponas peti detalojn rekte ĉe MT laŭ ties adresoj.

En la gramatika fako sprita desegnaĵo de *Bill Thome* helpas rakonti pri la ĉefaj partoj de la homa korpo.

*Gafur Gazizi* — nova nomo sur niaj paĝoj. Li fakte estas nek komencanto, nek komencanta aŭtoro. Sed li estas talenta esperanta poeto, kies verkoj jam aperis sur paĝoj de diversaj esperantistaj periodaĵoj kaj eĉ libroforme. Sed ĝuste al li antaŭ kelkaj jaroj okazis interesa aventuro, kiam li dank'al internacia lingvo Esperanto vojaĝis eksterlanden eĉ senpage. Ĉi tiu rakonto plene konformas al nia ĉefa temo "vojaĝoj per Esperanto'. La fino de la eksterordinara aventuro atendos vin en la 5-a numero.

Sur la sesa paĝo ni publikigas reehojn al nia rim-ludo, proponita en la 2-a numero kun la "RIMARO" de *Bill Thome*. Ni atendas pliajn variantojn de ŝerc-amuzaj rimaĵoj de vi, karaj legantoj. La rim-ludo aktualas ĝis la fino de la jaro! Sampaĝe vi trovos ne tre komplikan vortenigmon de *Aleksàndr Kondakov*.

Tradiciaj anekdotoj, adresoj por korespondi kaj horaroj de radioelsendoj estas sur la lastaj du paĝoj.

## DANKON!

al: ***Bård Hekland*** (Petrozavodsk, Rusio)
pro la financa kontribuo por KOMENCANTO

redakto-fino de "K"-5'99 la 15-a de julio

# MONDA TURISMO

*Ekzistas sufiĉe multaj organizaĵetoj kaj firmaetoj, kiuj okupiĝas pri turismo en kaj per Esperanto. Plejparte ili estas familiaj entreprenoj el 2-3 personoj, ĉar vere nemulton bezonas turisma afero. Sed jam pli ol 25 jaroj ekzistas, bone funkcias kaj per sia senlaca laboro pruvas utilon kaj valoron de la internacia lingvo organizaĵo "MONDA TURISMO". Ĝi estas organizaĵo, kiu ligas kaj eble kunordigas laboron de multaj vojaĝoficejoj esperantistaj kaj ne nur. En "K-1'99" ni menciis tiun nomon kaj ĉi-sube plenumas nian promeson kaj rakontas pli detale pri ĝi.*

La organizaĵo "MONDA TURISMO" estis fondita en 1970 jaro. Aliĝis al UEA en 1992.

**Celoj**:

Faciligi turismon per Esperanto. Faciligi al esperantistoj vojaĝi. Organizi aŭ partopreni amasturismon por pruvi la valoron de Esperanto.

**Agado**:

*Konstante*: Internaciaj turismaj aranĝoj kaj Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo.

*Ĉiujare*: Internacia Esperanto-Kongreso kaj Internacia Foiro de Esperanto-Turismo; kursoj por Esperanto-instruantoj, turismaj organizantoj kaj vojaĝgvidantoj.


*Ĉiun trian jaron*: ĝenerala konferenco.

**Membreco**: Individuaj anoj aliĝas senpage (post rekomendo de landa reprezentanto); subtenantaj anoj 20 IRK aŭ egalvaloro por tri jaroj; dumvivaj anoj 200 IRK aŭ egalvaloro.

**Estraro**: Prezidanto: *Andrzej Grzebowski*, vicprezidanto *Lucille C.Harmon* (Usono) kaj *Nan Youli* (Ĉinio). Ĝenerala Sekretario: *Milan Zvara* (Slovakio).

En 1972 komenciĝis organizita kunlaboro de vojaĝoficejoj kadre de "MONDA TURISMO". Ĉiujare MT eldonas kaj dissendas tutmonde "Turisman Esperanto-Kalendaron" kvante 3000 ekzempleroj! La Kalendaro por 1999 enhavas aktualajn adresojn de la organizantoj de internacia Esperanto-turismo el 93 landoj kaj kompletan liston de la plej gravaj esperantistaj aranĝoj en pli ol 30 landoj.

Tre grava direkto de la laboro de MT estas "Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo" en la urbo Bydgoszcz — klerigejo de San Marino, kie studas en ĉiutaga kaj koresponda sistemo preskaŭ 200 gestudantoj. Se vi volas praktike apliki Esperanton, ricevi bonajn impresojn kaj interesan vivon ankaŭ vi povas okupiĝi pri turismo per Esperanto, organizante vojaĝojn al Kongresoj, renkontiĝoj aŭ akceptante grupojn de esperantistoj en via loĝloko kaj regiono. Tiam tre bonan sperton donos al vi la menciita "Internacia Studumo.."




La grupoj de la Turisma Servo de MT "Esperantotur" ĉiujare atingas ĉirkaŭ 120 landojn de la mondo. MT okazigas ankaŭ ĉirkaŭmondajn vojaĝojn.

'Esperantotur" organizas ekskursojn per busoj, per trajnoj, aviadiloj kaj ŝipoj. Eble la plej grava kaj malfacila tasko, pri kiu parolis en la kunveno de "Monda Turismo" dum la 83-a Universala Kongreso en 1998 en Montpeliero, Francio ĝia prezidanto *Andrzej Grzebowski* estas fari *malmultekostan* turismon. Ne estas iuj problemoj por multekosta turismo. Sed trovi tiajn konbinojn de la vojbiletoj, hotelkostoj kaj ekskursoj, ke ili estu tute komfortaj kaj samtempe malmultekostaj estas vera problemo, kiun tamen "Esperantotur" sukcese solvadas jam dum multaj jaroj.

Jen, ekzemple, direktoj de tiel nomataj Flugkaravanoj — unu el flankoj de la laboro de "Esperantotur-MT":

Esperanto-flugkaravano ĉirkaŭ la mondo:

13junio-14julio — *Pollando-Meksikio-Tahitio-Cook-insuloj-Nov-Zelando-Fiĝio-Malajzio-Singapuro-Indonezio-Pollando* 2800$+900$

15aŭg-20sept — *Pollando-Kamboĝo-Singapuro-Nov-Zelando-Fiĝio-Tahitio-Usono-Britio-Pollando* 2800$+1200$

Por ĉirkaŭterglobа vojaĝo estas vere malmultekosta!

Se vin interesas pliaj detaloj pri MONDA TURISMO kaj ĝiaj eblecoj, kontaktu la organizaĵon laŭ la subaj **adresoj**:

Centra Oficejo, Turisma Servo "Esperantotur", Internacia Studumo pri Kulturo kaj Turismo, kaj Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo:

M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando.

tel.:(48-52) 3415744 aŭ 3460082; <turismo@bydg.pdi.net> aŭ <Andreo@rubikon.net.pl. (Esperantotur)>; TTT-paĝo: <http://www.bydg.pdi.net/-turismo>




# GRAMATIKO kaj KORPO

Ĉi-sube ni klarigas al vi la partojn de la homa korpo. Estas sendube utila afero scii ilin almenaŭ pro tio, ke tiuj "elementoj" estas la plej proksimaj por ĉiu el ni. Krome ni atentigas pri diferenco inter kruro kaj piedo, mano kaj brako, kiujn oni sufiĉe ofte misuzas. Nin helpas kiel ĉiam sprita desegnaĵo de *Bill Thorne* el Londono.

## PROVERBOJ

pri korpopartoj

Ne ŝovu nazon en fremdan vazon
En fremda mano pli grandas pano
Ne videblas makulo en propra okulo
Falas muroj ĉe virinaj femuroj




**Bill Thorne**
[Londono, Britio]

KAPO
1. hararo
2. frunto
3. brovo
4. okulo
5. nazo
6. buŝo
7. mentono

KOLO:
8. gorĝo
9. nuko

SUPRA MEMBRO
10. ŝultro
11. akselo
12. brako
13. kubuto
14. antaŭbrako
15. mano


BRUSTO
16. mamo
17. cico

ABDOMENO
18. talio
19. umbiliko
20. flanko
21. ventro

INFRA MEMBRO
22. kokso
23. femuro
24. genuo
25. kruro
26. suro
27. piedo
28. kalkano

**Brako** — ĉiu el la du supraj membroj de homo. Ĝuste tiu ĉi vorto devas esti uzata, kiam temas pri la tuta membro ek de la ŝultro ĝis la finoj de la fingroj kiel tuto.
**Mano** — la ekstrema parto de la brako, provizita per kvin fingroj.
**Kruro** — la tuto de la malsupra membro de homo (gambo)
**Piedo** — la ekstrema parto de la kruro, ĉe la homoj provizita per piedfingroj
**Fingro** — ĉiu el la ekstremaj moveblaj partoj de mano aŭ piedo

fingroj



*Gafur Gazizi fakte ne estas komencanto, nek komencanta aŭtoro. Li estas talenta kaj sufiĉe konata esperanta poeto. Sed ĝuste al li antaŭ kelkaj jartoj okazis eksterordinara aventuro, kiam dank'al internacia lingvo Esperanto li vojaĝis eksterlanden. Oni vidu, ke la afero okazis dum la "socialismaj tempoj" en eksa Sovetunio.*

**Gafur Gazizi**
[SALAVAT, Baŝkirio, Rusio]

# KIEL VOJAĜI PER ESPERANTO AVENTUROJ DE BRAVA ESPO

Oni diras, ke scii la anglan lingvon estas utile, precipe por fari eksterlandan vojaĝon. Mi, Espo, certe dubas pri tio. Dum pli ol dek jaroj kaj dek unu monatoj kaj 366 tagoj-noktoj-matenoj-vesperoj-ktp mi estas fervore studanta la anglan kaj ĝis nun mia persono neniun utilon havas de tio.

Sed jen Esperanto, pri kies "senutileco" oni multe parolaĉis aŭ fibabilis al mi, foje eĉ helpis min vojaĝi senpage tra Hispanio. Do, aŭdu la rakonton.

Tio okazis en la bela fora epoko, kiam en mia naskiĝlando — Baŝkirtostano "disvolviĝadis la konstruado de la matura socialismo". Tiam pri turisma administrado devis okupiĝi eksaj kolĥozanoj* aŭ "elirintoj el la glora laborista klaso".

Interalie estas tamen ankaŭ utilo en tio, ke preskaŭ en ĉiuj lernejoj de la mirinda Baŝkirtostano oni devis studi la anglan aŭ la germanan lingvojn sen atenti pri la aliaj eksterlandaj.

Tiel en 1988 feliĉe okazis, ke en mia loĝ-urbo Salavato oni decidis aranĝi la unuan en la vivo de la urbo turisman vojaĝon al Hispanio. Oni rapide kolektis la 20-personan grupon da "decaj kaj morale stabilaj" homoj. La grupo laŭ tiamaj tradicioj devis konsisti duone el la elita intelegencio (t.e. funkciuloj kaj diversaj estroj-prezidantoj), duone el la laboristoj kun kolĥozanoj.

Sed evidentiĝis, ke la akceptanta turisma firmao postulis: la grupon akompanu du lokaj gvidantoj, sciantaj ne la anglan, sed la hispanan. En la urbo tiam estis nur unu fakulo de la hispana lingvo. Cetere tiu estis mia bona konato, kiu kelkfoje antaŭe vizitis mian E-kurson. Kaj jen tiu ĉi mia amiko-konato tuj trovas min kaj proponas:

— Espo, ĉu vi volas senpage vojaĝi en Hispanion?

— Jes, tio estas mia deinfanaĝa revo!.. - jubile krias mi-Espo.

— Do iru kun mi, mi vin proponos kiel la duan interpretiston de la hispana en la turisman grupon.

— Sed mi ja ne scias la hispanan!

— Kara mia, sed ĉu ne vi scias perfekte Esperanton?

— Mi-i...

— Do, rememoru, vi ja diradis, ke Esperanto estas latinida lingvo je 60%, ĉu ne?

— Jes...

— Nu, jen, tiam ni diru, ke vi scias ankaŭ la hispanan, bone? Prenu la hispanan frazlibron kaj studetu ĝin, - konkludas la konversacion mia avantaĝa amiko.

Mi ne scias, kia diablo persvadis kaj kuraĝigis min komplici en la fi-afero, sed mi malgraŭ mia absoluta honestemo, konsentis...Kaj jen....

**(daŭrigon legu en la sekva numero)**




**Janalieva Zuhra** [URALSK, Kazahio]

*(*kolĥozano - ano de kolĥozo, socialisma agrikultura kampara kooperativo)*

Bill Thorne

RIMARO

Helpilo por verkisto de poemoj aŭ kantoj

*Venis la unuaj reehoj al la vortludo pri la rim-verkado, publikigita en K-2'99.*
*Ŝajnas estas sufiĉe amuzaj rimoj. Prenu KOMENCANTOn-2'99 kaj provu verki ion amuzan je tiuj rimoj. Provu!*

*Verkado estas la plej bona trejnado*

**Ludmila Leksina**
[SUDĴA, Kurskaja obl., Rusio]

## AMO

De virino **amo**
ĉiam estas **dramo**.
Ne komprenas **flamon**
Pliiganta **gramojn**
Ĉi "**hipopotamoj**".
Estas la **ornamo**
Virino por **reklamo**,
Kiu kovras **tramon**,
Vokas al **vigvamo**
Kie loĝas **damo**.
Por virino **famo**
Estas nun la **samo**,
Kiel la **balzamo**,
Kia **panoramo**!
Damo kaj **teamo**

## ALO

Tiam la homoj, *animaloj*
Kune organizis *balojn*.
Gajo! Vino en *bokaloj*,
Dancis homoj kaj *ĉevaloj*.
Granda danco de *finalo*!
Festo estis la kialo.
Sed subite... Jen *detaloj*!
La maljuna *generalo*,
Kiu organizis *balon*,
Venis foje en la *halon*.
Liaj puraj *idealoj*
Kaj moralo de *ĵurnalo*
Deprimigis la *kvartalon*.
Estis li por ĉiuj *malo*,
Generalo kun *medalo*
("La juvelo" de *metalo*),
Granda estis la *skandalo*!
Venkis ĉiujn la **moralo**.

**Zuĥra Janalieva**
[URALSK, Kazaĥio]

Nelonge min vizitis amo
Sed ĝi finiĝis per la dramo
Ĉar ĝia tre malgranda flamo
Ne donis varmon, eĉ ne gramo

✧ ✧ ✧

Mi estas vere gaja damo
Kaj min renkontis generalo.
Nun estas li kvazaŭ ornamo
Por mia vivo, kaj balzamo.


✧ ✧ ✧

Mi havas unu idealon
Ĝi estas lingvo Esperanto
Kaj skribas mi en la ĵurnalon,
Malgraŭ ke estas
KOMENCANTO




**Nina Vinnikova**
[NOVOALTAJSK, Altajskij kraj, Rusio]

**Aleksandr Kondakov**
[SKALISTIJ, Murmanskaja obl., Rusio]





## VORTENIGM O SERPENTO

1. valora metalo 2. elemento de homa aŭ besta skeleto 3. frato de patro 4. frukto 5. monato 6. malhelpo,baro 7. tiu parto de la horizonto, kie la suno ŝajne subiras 8. maniero korekte skribi la vortojn

**RESPONDOJ K-3'99**
vortkrucenigmo

*horizontale:*
1.papilio 3.bradipo 5.virŝoko
7.rozmareno 9. narciso 11.kaprino
13.mandato 15.kolibiko
16.laktolo 17.kompoto

*vertikale:*
1.paguro 2.igvano 3.bikino
4.paduso 6.katamarano
8.rostro 10.cikado 11.kamelo
12.nikelo 13.monako
14.tomato



**Viktor Alikin**, [Permo, Rusio]

Parolas du najbarinoj:
— Via edzo tiom maldikiĝis! Kiel li faris tion?
— Li ĉiun taĝon iras fiŝkapti.
— Kaj kaŭze de tio li tiom maldikiĝis?
— Certe. Li manĝas nur tion, kion kaptas.

ӿ ӿ ӿ

Sidas fiŝisto sur bordo de rivero. Surmetis vermon sur la hoketon kaj ĵetis tion en la akvon. Subite vidas: la vermo eksaltas el la akvo kaj rapide naĝas al la bordo.
— Kio okazis? - miras la fiŝisto.
— Kio okazis! Kio okazis! Fiŝoj min tie preskaŭ formanĝis!

ӿ ӿ ӿ

Antaŭ kelkaj tagoj mi kaptis fiŝon, kiu pezis tridek kilogramojn, - parolas unu fiŝisto.
— Sed mi antaŭ nelonge kaptis sur la fiŝhokon kandelingon kun kvar kandeloj kaj ĉiuj kandeloj brulis, - respondas la dua fiŝisto.
— Aŭskultu, - parolas la unua fiŝisto, - se mi forigos de mia fiŝo dek kilogramojn, ĉu estingiĝos la kandeloj en via kandelingo?

---

— Ĉu vi scias, mia kara, kial la fiŝoj ne parolas?
— Ne, mi ne scias.
— Kaj vi ŝovu la kapon en akvon kaj provu diri ion!

## *el vivo de kuracistoj kaj ties pacientoj*

La edzino demandas kuraciston:
— Doktoro! Ĉu ekzistas almenaŭ eta espero?
— Dependas de tio, je kio Vi esperas.

***

Oni telefonas al la urĝa medicina helpo.
— Mia filo forglutis skribilon.
— Atendu, ni baldaŭ venos.
— Sed kion mi faru ĝis via alveno?
— Skribu per krajono.

***

Kuracisto observas malsanulon:
— Bone, bone...tre bone.
— Doktor, ĉu vere, ĉio estas bone?
— Ne. Bone, ke tio okazis ne al mi.

***

— Sinjoro kuracisto, kion signifas en mia diagnozo literoj "D" kaj "S"?
— Diablo scias!

***

Ĉe la enveno en la svisan urbeton staras ĉevoja ŝildo:
"Ni petas stiri aŭtojn pli atente. La kuracisto kaj la ĉerkisto forveturis ferii".

***

— Ĉu vi havas pedikojn?
— Havas.
— Kaj kiel vi ilin kuracas?
— Ili ĉe mi ne malsanas.



# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 5 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de "K" - senpage

s-ino *Olga Ĵilina*
27 jaroj, psikologio, lingvoj, turismo. **Mi serĉas viron de miaj revoj!**
(Usono, Anglio, Kanado ...)
Makeeva, 42-125, MIASS,
Ĉelabinskaja obl., 456320
RUSIO

*Darina Gazizova*
10-jara filino de E-verkemulo, deziras ricevi leterojn en la angla, kiuj lernigus al ŝi E-ton
p.k. 88
SALAVAT - 14
Baŝkirio, 453200
RUSIO

s-ino *Pavla Zemanova*
"Ajŭrvedo"-natura herba kuracado, kaj hinda kulturo; ŝatas hundojn
U stareho mlyna 18/16,
CZ - 104 00
UHRINEVES
ĈEĤIO

*Alla Utkina*
**17-jara studentino, kulturo, sporto, literaturo, foto, turismo**
Mamina-Sibirjaka, 51-61
LESNOJ, 624205
Sverdlovskaja obl.,
RUSIO

s-ro *Carlos Alberto Ponce Madera*
19-jara, instruisto pri konstruo, kor. tutmonde
str.82-A #5202 e/53y55,
Marianao, HAVANO,
KUBO

f-ino *Yudiely Valdivia Galiano*
18-jara, metiistino, korespondi tutmonde
str.82-A #5202 e/53y55,
Marianao, HAVANO,
KUBO

s-ro *Zyunitiro Hong*
korespondi pri komputiloj
Minami-Nakaburi,
2 tyôme 8-43
HARAKATA, 573
JAPANIO

f-ino *Jurga Ranyte*
19-jara studentino, muziko, turismo, sporto, turismo
Kuŝuri 60-50
LT.3040, KAUNAS
LITOVIO

s-ro *Fridrik Kristjansson*
homaj problemoj kaj disvastigo de Esperanto
Byggdavegi 141,
IS-600 AKUREYRI
ISLANDO

s-ro *Martin Reles*
interŝanĝi poŝtmarkojn kun gesamideanoj tra la tuta mondo
Fray Juan 25-6-K.
ES-48013, BILBAO
HISPANIO

s-ino *Silvia Brylska*
30-jara juristino, pri ekonomio, politiko, reala socialismo
Kilinskiego 11 B 2,
PL.74200, PYRZY
POLLANDO

s-ro *Romas Vosylius*
33-jara gazeta direktanto, pri naturo kaj sporto
Svietimo 20
LT.4520
MARIJAMPOLE
LITOVIO

s-ro *Eoin O.Chara*
pri popolaj kantoj tutmonde
11 Bozhar Na Pairce,
Cill Airne,
CHIRDAL
IRLANDO

s-ro *Alvaro Rabelo*
deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj
C.P.21,
Cascavel,
85 808-970 - PR.
BRAZILO

Sun Sun
28 jara direktoro de farmacia kompanio, kun esp-istoj de la sama profesio pri ĉina medikamento, , turismo
32-1107, Jiangwan Lu,
Guangzhou 510110,
Guangdong,
ĈINIO

*Juho Ilmari Vattulainen*
korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj
81160 Romppala,
Rantakylantie 64,
FINNLANDO

## RADIO AŬSTRIA INTERNACIA

**Semajna komentario, raportoj, felietonoj, leterkesto**
**dimanĉe: 0404, 1405, 2305, UTC**
**frekvencoj/metroj:**
**Eŭropo 6.155kHz/49m; 13730/22m**
**Latinameriko: 2305 9.870/31m; 13730/22m**

**UTC — Universal Time Coordinated (Grinviĉ)**
**CEST — Centra Eŭropa Somera Tempo**

## ĈINA RADIO INTERNACIA

| UTC | Regionoj | Ondoj(m) | kHz |
|---|---|---|---|
| 11:00-11.30 | Japanio, Koreio | 41,84 | 7170 |
| 13.00-13.30 | Sudorienta Azio | 25,86 | 11600 |
| 20.00-20.30 | Eŭropo | 40,51 | 7405 |
| 22.30-23.00 | Latin-Ameriko | 30,43 | 6860 |

CEST=UTC+2h

## OkSEJT-39 Okcidenta Sovetia Esperantista Junulara Tendaro

TIĤVIN, Leningrada regiono, RUSLANDO, 4-14 de julio 1999. 10 tagoj de mirinda vivo en la Verda Respubliko! Tre riĉa programo — kursoj, ekskursoj, konkursoj, bonega ripozo sur la naturo! Detalajn informojn petu ĉe: **Ruslando, 187500, Leningradskaja ob., TIĤVIN-6, a/k 2, SEJT**

